



NIGRAJ NUBOJ SUPER ROĴAVO

Ili foriras. Ne estas la unua fojo, kaj la kurdoj sciis, ke la aliancanoj povus ilin perfidi. Dum la malvarma milito ambaŭ blokoj ludis la kurdan karton: Henry Kissinger instigis al ribelo la sudajn kurdojn⁽¹⁾ en 1973 kaj ilin forlasis en 1975. Dudek jarojn poste, laŭ peto de Vaŝingtono ekribelis la kurdoj, sed Usono limigis sian ofensivon al Kuvajto, kaj Saddam Hussein kontraŭatakis kontraŭ kurdoj kaj ŝijaistoj. Nur kvin jaroj estis pasintaj de la ĥemia atako kontraŭ Helebĝo⁽²⁾.

Tiama interesa dokumentfilmo titoliĝas “Bonkonduktaj kurdoj, fiaj kurdoj”. La *bonkonduktaj* estis la sudaj kurdoj, kiuj alianciĝis kun Usono; la *fiaj* estis la kurdaj partizanoj, kiuj batalis kontraŭ Turkio, membro de NATO. Ĝi estis antaŭdiro: ŝajne, la gerilo iniciatita de Abdullah Ocalan estas terorisma, kiam ĝi batalas kontraŭ Turkio, sed tiuj partizanoj aliancas kun Usono de post 2015, kiam oni vidis ilian efikecon kontraŭ la ĝihadistoj en Kobano kaj Ŝengalo⁽³⁾.

Dum tiuj ĉi tri jaroj la kurdoj forte aliancis kun Usono, sed ili scias, ke la usona ne estas la nura monda imperiismo, kaj por dementi tiujn, kiuj por ĝin batali blinde enviciĝas je aliaj imperiismoj – kvazaŭ la arabaj ŝtatoj aŭ Rusio ne estus subpreminta la ekstermitajn dekojn da lingvoj kaj popoloj –, ili elpensis ludi la karton laŭ la momento. “Ni konscias, ke la usonanoj ne ŝatas nin”, amiko diris al mi, “sed la afero ne estas, ĉu ni fidus je ili aŭ ne: se vi estas sinkanta marmeze kaj iu etendas al vi la manon, vi ne demandas, ĉu ĝi estas de amiko aŭ de krokodilo.”

Je la packonferenco de Ĝenevo Vaŝingtono prezentis la vetoon de Turkio kaj la opoziciaj grupoj de Sirio kontraŭ la ĉeesto de la kurdoj. Rilate la kurdojn, ilin oni rigardis nur kiel efikajn militajn kunlaborantojn. Plejofte estis Rusio, kiu prezentis la kurdajn proponojn, kaj en Moskvo havis la PUD⁽⁴⁾ ties internacian buroon. Same kiel Usono Rusio historie ankaŭ perfidis la kurdojn: en 1946 stariĝis la Kurda Respubliko de Mehabado⁽⁵⁾, la unua moderna ŝtato de la kurdoj, sub la protekto de Stalino; sed kiam Sovetio atingis interkonsenton kun Britio rilate Iranon, ĉio perdiĝis. Kaj tamen, estis en la soveta Armenio, kie ekzistis dum jaroj kurdaj radio kaj eldonejoj, kiam tio ne eblis en la Turkio apartenanta al la NATO nek en la Irano de la ŝaho.

Kiam en 2011 ekis la unuaj protestoj en Sirio, kelkaj kurdaj junuloj, laŭ la frustra ondo ĝeneraliĝinta en tuta Mezoriento, eliris protesti, sed la PUD-membroj ne subtenis ilin, kaj ili estis ofte subpremitaj. Spite al la multaj tiamaj kritikoj, la tempo montris, ke la neenmiksiĝo en tiu konflikto “inter araboj” estis prava decido: oni bone memoris, kiel frate kuniĝis alavitaj kaj sunaistaj araboj por tretaĉi la kurdojn dum la masakro de Kamjŝlo⁽⁶⁾ en 2003. Dum pliakrigo de la lukto al-Assad koncentris siajn trupojn en la ĉefaj urboj inter Damasko kaj Aleppo, kaj laŭ la malapero de la ŝtato la kurda movado ekregis en sia teritorio. Laŭ la siria opozicio ekzistis interkonsento inter la kurda movado kaj la reĝimo de al-Assad.

Tri kantonoj organiziĝis je tia neebila ekvilibro: Afrino okcidente, proksime al la Mediteraneo, Ĝiziro oriente, limanta kun Suda Kurdio kaj posedanta petrolkampojn. Meze inter ili estas Kobano, ĉirkaŭita de vilaĝoj setlitaj de araboj translokigitaj el la sudo fare de la Baaz-partio en sia arabigkampanjo.

La retreto de Usono povas ĉion ĉi ŝanceligi, se la minacoj de Turkio efektiviĝas. Jarkomence, el Afrino devis forfuĝi centmiloj da kurdoj antaŭ la atako de la ĝihadistoj sub la komando de Ankaro. Same kiel komence de la milito, oni strebis kunordigi kun Damasko klopodon por haltigi la invadon de Turkio, sed el Alepo alvenis nur eta milicanaro, neniam la armeo: Erdogan havis verdan lumon de Putin.

Nun, oni devos vidi ĉu tiu ĉi projekto, kiu mirigis la tutan mondon, malaperos: ĝi estas la plej interesa sperto, en Mezoriento potenciganta la virinon, kie kape de la politika aŭtoritato ĉiam estas po ino kaj viro; kies ekzemplaj knabinaj batalaĉmentoj kaj multhomaj batalionoj komandataj de virinoj liberigis Rakahon; tiu desupra demokratio, je kiu unuiĝis muzulmanoj, jazidoj, kristanoj kaj aliaj diverskredaj homoj; kiuj malgraŭ la malpermeso de al-Assad disvolvis eduksistemon en la kurda kaj asiria lingvoj, inspirite de la *ikastola*-sistemo(7).

Tia demokrata sperto ne estas tro forta karto por ludi ĉe la tablo de la internacia diplomatio. Dum la lastaj tagoj, la kurdoj ricevis grandajn solidarecesprimojn, sed tio ne defendos ilin, se Turkio trovos liberan vojon por invadi. Jim Mattis, la usona Sekretario pri Defendo, demisiis same kiel Brett MacGurk, ĉefo de la lukto kontraŭ la Islama Ŝtato. Eĉ agnoskinte la venkon de Moskvo, malfacilos al Trump pravigi sian subordigon al Irano rilate tiun ĉi aferon, kaj multe pli siajn intencojn rilate la centojn da ĝihadismaj kaptitoj, kiuj estas enkarcerigitaj en Roĵavo. Nigraj nuboj super Kurdio.



Notoj: (Nomoj en la kurda lingvo, krom la indikitaj).

- (1) Suda Kurdio/Bashurê Kurdistanê. La kurda teritorio ene de la Iraka ŝtato.
- (2) Helebce.
- (3) Ŝengalî.
- (4) Partio de la Unio Demokrata (PUD)/Partiya Yekîtiya Demokrat (PYD).
- (5) Komara Kurdistanê ya Mehabadê.
- (6) Qamişlo.
- (7) *Ikastola* signifas lernejo en la eŭska lingvo. Ties lernosistemo konsistas en merĝado en la lingva etoso. Oni ne nur instruas la lingvon ser oni ĉiun fakon oni instruas per ĝi.

KLARIGOJ:

Aŭtoro: Urtzi Urrutikoetxea.

(*) Originale aperis en la eŭska ĵurnalo Berria la 23-an de Decembro 2018-a.

Tradukis: NXC. Decembro 2018-a. Provlegis: DS.